

La Esperanto-Gironde Informilo



MARTO 2026

N° 182

Ni festu printempon!



ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 14an de decembro 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a
Zamenhof-tago

Ĉeestas: Annie kaj Jean-Seb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Joël Lajus, Isaac Marchand, Dominiko kaj Geneviève, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Jaya Paschale, Klodin' Pomiro, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon

Senkulpigitaj: Gloria Gargalo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Jean-François Seylier

Elvezio: salutas al ĉiuj kaj dankas pro LEGI 181.

Informas, ke estas disponeblaj la kalendarretoj 2026 de Esperanto France.

Pri Brassens-libro:

Yannick: La afero kun la muzeo en Sète finfine bone solviĝis: La pakaĵo bonorde alvenis al Sète kaj la muzeo pagis.

46 ekzempleroj estis venditaj, el kiuj 15 kun 30%-rabato = 747€

Elspezoj: 994€ (aŭtorrajtoj + presado)

Restas: 25 ekzempleroj ĉe Yannick, 6 ĉe Marcelo, 5 ĉe Eriko = 36

Marcelo: Dennis Keefe, grava esperantisto, estis antaŭ nelonge en Bordojo. Li eble partoprenos en la Grajneto, ĵaudon la 18an. Li kreis kurson: BEK kurso (Baza Esperanto Kursaro).

Datoj de la venontaj kunvenoj:

18an de januaro: Salle du Bourg

22an de februaro: Salle du Bourg

29an de marto: Salle de Toctoucau: Jen la adreso: Avenue G. Pelletier 33600 Pessac France (<https://www.mobalink.fr/place/maison-de-quartier-toctoucau-vDb5jYzAKx>)

26an de aprilo. Salle de Toctoucau: Ĝenerala Asembleo

24an de majo: Salle du Bourg

28an de junio: Salle du Bourg



Elvezio: Artikolo farota pri la grupo por Le Monde de l'Espéranto. Janine zorgos prie.

Dominiko: La bildstrio estas fintradukita. Oni povas ĝin eldoni perrete.


Klodin': Estus oportune de nun rezervi salono por la veno de JoMo en decembro (13an de decembro seeble).



Elvezio: Okazis Virtuala Kongreso de Esperanto. Seán, Marcelo partoprenis aŭskultante. La dissendo estis pere de Discord sed ĝi ne bone funkciis.

Luca: Gitarludas ĉiun mardon de la 20a30 ĝis noktomezo en trinkejo Connemara.

Marcelo proponas eventualan projekton: Internacia literature konkurso «Hristo Gorov-Hrima» 2026: «Mia plej bela Esperanto-rememoro». Anonco el *Esperanto* (organo de UEA, dec. 2025)



Yannick: La prelego pri Brassens ne povos okazi en 2026, ĉar la programo jam estas komplete. Do Marcelo sendu denove sian proponon por 2027.

Elvezio konsilas la legadon de la Kuriero de UNESKO pri manĝaĵoj: Kio kunigas nin? La kursoj en la universitato okazas ĉiun merkredon je la 17a30 en salono G207.

La kunveno finiĝas je la 12a15.

Alvenas Karima kaj poste du studentinoj.

Posttagmeze, **Marcelo** prezentas bildaron pri la Interna Ideo, por festi la Zamenhof-tagon. Li prezentas la libron Vivo de Zamenhof de Privat. Poste li montras bildaron pri Rob Moerbek, forpasinta antaŭ nelonge. Li ekkonis Rob en 1998. Ni legas poemon de Kalocsay omaĝe al Zamenhof: *Ni laŭdu lin*.

Poste ni aŭskultas kaj kunkantas *La vojo-n de Zamenhof*, muzikigitan de Hiroshi Nobukuni.

Sekvas diskuto en la franca pri la interna ideo.

- Comment définir l'espéranto : langue ? idée ? mouvement ?

Voir *L'Homme qui a défié Babel* de Masson et Centassi.

Klodin' : L'idéal pour Zamenhof était de parler une même langue pour se comprendre et ne pas se haïr.

Joël cite un extrait du discours de Boulogne-sur-mer. La communication en espéranto ne sera pas suffisante en elle-même mais donne une idée de fraternité. Le discours se termine par une prière qu'il n'a pas lue, à la demande du comité organisateur.

Janine : La question de la laïcité était brûlante à cette époque en France.

Zamenhof a voulu créer une religion universelle comme il l'avait fait d'une langue universelle.

Seán : Il a souligné qu'il existe des points communs entre toutes les religions.

La laïcité à la française suppose de respecter l'autre dans ses croyances, ce qui permet d'échapper à la barbarie.

Joël : Le mot «samideano» comporte l'idée de fraternité.

Klodin' : Il ne devrait pas y avoir de messe dans les congrès.

Yannick : Pourquoi pas ? On est libre d'y assister ou pas.

Joël : samideano = qui a la même idée. Dans un groupe, une association, un syndicat, on est regroupé autour d'un projet commun porté par une idée. Samideano porte l'idée interne, la recherche de la fraternité, de la tolérance, de l'amélioration de l'humanité.

Klodin' : L'espéranto est une langue, pas une idée (espérantisme).

Karima : J'adhère à l'idéal de l'espéranto mais je ne parle pas la langue.


Luca : L'espéranto n'est pas juste une langue : on fait le choix de l'apprendre. Parler espéranto est un choix militant, un acte de foi. On le pratique pour qu'il se diffuse.

Klodin' : Une langue véhicule des idées, une culture mais elle n'est pas cette idée.

Marcelo : Est-ce que Zamenhof a encore de l'influence sur le mouvement aujourd'hui ?

Aujourd'hui l'espérantisme ne porte plus l'idée de religion.

Le samideano est celui qui a une idée, un but commun ; est-ce tout simplement l'espérantiste ? La langue évolue avec les gens qui la pratiquent, de même l'idée interne.



Seán : L'anglais est attaché à l'argent ; le français à l'élégance ; l'espéranto à la fraternité.

Joël : La langue évolue, le mouvement aussi. La langue remue des idées, elle est plus qu'un outil. L'espéranto comporte à la base l'idée de recherche de la fraternité, de la tolérance, de la justice (par exemple les droits linguistiques), d'unité.



Comment Zamenhof aurait-il pu comprendre le schisme de 1921 ?

Yannick : Dans le discours de Boulogne, Zamenhof dit que sont réunis là « non des Français avec des Russes ou des Polonais, mais des hommes avec des hommes ».

Joël : Zamenhof est né dans une famille juive. Les juifs étaient détestés par tous ; la souffrance qu'il a éprouvée de cette haine l'a encore plus porté vers ce projet de langue internationale.

Klodin' : De Saussure dit qu'une langue est un outil et Von Humbolt, que la langue influence et façonne notre esprit. Comment une langue influence-t-elle la pensée ?

Yannick : Les linguistes parlent de langue maternelle. L'espéranto, quand Zamenhof l'a créé, n'était la langue maternelle de personne. Aujourd'hui, les espérantistes, même 'denaskaj', parlent au moins une autre langue en plus.

Marcelo : La spécificité de l'espéranto est qu'elle n'a pas été apprise par l'oral, naturellement, à la naissance, mais d'abord par l'écrit.

Joël : L'idée de la langue influence la façon d'être : les pays impérialistes ont imposé leur langue, qui façonne la façon d'être, de penser. L'espéranto au contraire fait réagir en universaliste.

Janine : Certains mots n'existent pas dans certaines langues, donc la façon de penser dépend de l'existence ou non de mots pour nommer les choses.

Seán : Le verbe avoir n'existe pas en irlandais mais il existe plusieurs façons de dire être. On ne dit pas « Je suis fatigué » mais « Il y a la fatigue sur moi », ou « J'ai un livre » mais « Un livre est à moi ».

Janine : Si l'espéranto existe encore aujourd'hui et non le volapük, c'est parce que l'espéranto comporte une idée interne et non le volapük.

Dominiko : L'espéranto est une langue libre et démocratique, alors que le volapük était la propriété de son créateur.

Une étudiante : L'espéranto est une langue multiculturelle.

Une autre étudiante : En Inde il existe de très nombreuses langues. On parle anglais par nécessité, et non espéranto. On choisit l'espéranto pour l'idée de fraternité.

Omaĝe al

Ludoviko Lazaro Zamenhof

(15an de decembro 1859 - 14an de aprilo 1917)

Ni laŭdu lin

funebra poemo de Koloman Kalocsay

Memora fest'...dolora fest'...
Funebre ni solenas...
Ho, flugis for la flam' de l' kor'
Kiun ni larme benas.

Nun nek kanon' kun tondra son',
Nek sonoriloj festas...
Nur batsonor' de nia kor'
Pri la solen' atestas.

En vasta mond' malgranda rond'
Ja estas ni, la fratoj,
Sed kun potenc' en sankta senc'
Kuniĝas la korbatoj.

<https://enikibyhistory.getarchiva.net/topics/klara-zamenhof/esperanto>



1922 de maldekstre : Eduardo Wiesenfeld, Klara Zamenhof, Odo Bujwid, P. Muszkatblatt, Stanislaw Essigmann, Leo Belmont.

Ho, kunsonor' de nia kor'!
Funebru la Benatan,
Per kies am', jen, flagra flam'
Kunfandis rondon fratan.

Estingis sin la flam' de l' sin',
Plu arde ĝi ne hardas,
Sed jen la Verk', ĝi malgraŭ ĉerk'
Kaj malgraŭ frostoj – ardas!

Ĝin vartu ni, ho, ardu ĝi,
Ke en malgranda sfero
Post vintra frost' la Pentekost'
Alvenu sur la Tero,

Kaj en kompren', eterna ben'
Fratigu mondo tuta...
**Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin
Homaro surdemuta!**

Omaĝe al

Elvezio!

la plej svisa el Esperanto-Gironde!

LA TUNELO DE SANKTA GOTARDO

poemo de Reto Rossetti

En Ajrolo en Svislando
stria longa voj-rubando
torde, plekte, volvmalrekte
supreniras montdirekte:
tridek kilometrojn longa,
kiel vosto anakonda.

En Ajrolo, tra malhelo,
kuras la fervoj-tunelo:
rekte, sen hezit', sen dubo,
kiel revolvera tubo.
supre fluas vojo plekta,
sube – la tunelo rekta.

Iam, por el unu valo
al la transa valo veni,
oni devis sur spiralo
de la longa vojo peni.
Nun la verva homspirito
tra la montbloko boris...
Mi rigardis en medito,
kiaj la sceno parabolis :



Valo estas ja nacio,
monto estas tradicio.
Migras sur la montobaro
nacilingvo al najbaro.
Esperanto en atako
tranĉis tra la tradicio;
ĝi per la potenco brako
sin proponas al socio.

Dum ĝi kuŝas sub okuloj,
ĉu ne estas vera honto,
vidi tiom da blinduloj
ŝviti sur la granda monto ?



Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 18an de januaro 2026
de la 10a 30 ĝis la 16a
Reĝfesto



Ĉeestas: Annie kaj Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Joël Lajus, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Eric Tiffon

Senkulpigitaj: Luca Buselli, Dominiko, Klodin' Pomiro, Jean-François Seylier

Elvezio: deziras al ĉiuj feliĉan jaron.

Dankas Dominikon pro la informletero.

Informas, ke Luca malsanas kaj devas ripozi en kliniko.

La kursoj rekomenciĝos en la Universitato merkredon la 21an de januaro kaj daŭros ĝis meze de aprilo.



Projektoj:

- Prezento de Esperanto en Sainte-Hélène la 9an de februaro far Dominiko.

- Eseo pri la plej bela Esperanta rememoro.

Bernardo: Mia plej bela Esperanta rememoro estas mia unua partopreno en UK en Kubo.

Elvezio kaj Seán partoprenis en la virtuala kunveno kun UEA pri Espe-

ranto en la Universitato. Partoprenis François Lo Jacomo, Mireille Grosjean, kiu laboras kun grupo en Afriko kaj bezonas helpojn.

Pri Brassens-libro: Yannick: Nenio okazis en decembro.

Restas 25 ekzempleroj + 6 ĉe Marcelo (el kiuj 3 por Blaise) + 5 ĉe Eriko + 1 por la universitata biblioteko.

Entute: 34 vendotaj libroj.

Elvezio: Oni devis pagi 0,60 € al la municipo por fotokopioj (ni transpasis la limnombron de senpagaj fotokopioj).

Eric: La kunveno en la Grajneto okazos merkerdon la 21an de januaro.

Seán: Esperantistaj aŭstrianoj deziras agnoskigi Esperanton kiel parton de la kultura heredaĵo de Aŭstrio ĉe UNESKO. Pollando kaj Kroatio tion atingis. Litovio kaj Italio laboras por tion atingi.

Janine: La artikolo pri Espertanto-Gironde por LME estis sendita. Plie, ili petis artikolon pri MLA far Seán. Ankaŭ ĝi estis sendita.

Marcelo kaj Klodin' gastigis Dennis. Li estas usonano, laboris ĉe IBM kaj forlasis tiun laboron por dediĉi sian vivon al Esperanto. Li gvidas diversajn Esperanto-kursojn en Valencio (Hispanio).

- **Novelo Sorĉe de verda stelo:**

Ĝi iĝis teatra spektaklo, eble prezentota en venonta UK en Graco.

Nanne Kalma verkas la muzikon. Duvoĉa rakonto: Koreino (virina) kaj Marcelo (vira). Kantoj de Kajto kaj Amira (koreino). Pentraĵoj de Kyina (koreino).

Artistoj: Kajto kaj la AER (Artista Efemera Rondo) (vd p.15)

Marcelo petas de Seán, ke li bonvolu apogi tiun projekton ĉe UEA.

Alia projekto de Marcelo: verko de romano. Kontrolo far korea amiko (la lasta parto okazas en Koreio).

La lasta paŝo estos ĝin publikigi. Ĉu Espéranto-Gironde pretas kunhelpi en la financado de la eldono? Povus esti pere de SAT-eldonfako. Oni povas pensi pri antaŭmendo. La romano estos ĉirkaŭ 300-paĝa.

Jean-Seb: Estus bone, ke televid-serio rakontu la vivon de Zamenhof. Teatra amikino diris, ke ŝi pretus surscenigi teatraĵon pri tiu temo, se iu ĝin verkas.

Marcelo: Arno Lagrange prezentis teatraĵon, kie li ludis Zamenhof-on en Bulonjo. Oni povus kontaktiĝi kun li.

Jean-Seb: En la prelego de Christian Lavarenne pri Zamenhof, estas multaj interesaj faktoj.

Joël: Patrick Chazot, d'Espéranto-Périgord a pour projet de transmettre l'espéranto à ses enfants et petits-enfants; il a fait imprimer à compte d'auteur 100 albums *Gaspard et Félix: Les pouvoirs de l'espéranto*. On peut acheter son album. C'est un élève de Claude Labetaa.



Bernardo: Antaŭ kelkaj tagoj instruistino en baza lernejo diris, ke ŝia avo estis Esperantisto en Dordonjo.

Seán: La sidejo de UEA devas translokiĝi. Oni ne scias, kie estos la nova sidejo. Proponis Bruselon. Sed UEA heredis du loĝejojn en Oslo. Aliflanke UEA ŝatus, ke la sidejo restu en Nederlando.

Yannick vokas por la pago de la kotizoj:

Individua: 20 €

Para: 27 €

Studenta: 10 €

La kunveno finiĝas je la 12a.

Post la manĝo (kun reĝkukoj!) eekas la ateliero pri Mia plej bela Esperanto-rememoro.

Atelier de janvier à mai -> rédaction en juin.

- Récolter les thèmes de chacun et en choisir trois maximum, qui serviront de base pour le travail aux prochaines réunions.

« Mia » : celui qui signe le texte, mais pas forcément celui qui rédige. Par exemple, on peut raconter le 1^{er} congrès à Boulogne en 1905, à partir des souvenirs et émotions de chacun à son premier congrès (Bernard : Cuba ; Elvezio : Séoul).

Ateliers à partir de février : on se répartit sur trois tables et on développe le thème choisi. A la fin de l'atelier du mois, on aura rédigé 10-15 lignes.

On peut échanger entre deux séances.

En juin, on disposera de trois textes.

Temoj:

1/ Seán: Kiel Esperanto helpis la irlandan lingvon

2/ Janine: La UK en Lillo: preparado, disvolviĝo, stratkantado...

3/ Joël: Vizito en Hungario ĉe korespondanto en 1980. Li gastigis ankaŭ polan korespondanton; ambaŭ estis scivolemaj pri la vivo en Okcidento.

4/ Elvezio: UK en Seulo, kiel komencanto. Gastigita pere de Pasporta Servo. Ilustro de la interna ideo.

5/ Jean-Seb: Multaj agrablaj memoraĵoj, sed ne unu elstara

6/ Annie: Deux jours pour la fête des cheminots, avec le spectacle *La sekreto de la magia trajneto*.

7/Katya: Kiam Esperanto fariĝis viva. Vojaĝo al Francio, bezono de Esperanto por komuniki kaj utilo de Esperanto por lerni la francan.

8/ Yannick: Mia unua renkonto kun pluraj personoj, kun kiuj mi babilis per la reto en 1998.

9/ Titolo: *Ŝi nomiĝis Maruška*: korespondado al 10jara knabo de ĉeĥa korespondantino, kiu daŭris ĝis ŝia morto.

10/ Sentoj de Klara Z, kiu decidis konvinki sian patron financi la unuan libron de Esperanto.



-> Elekti inter la proponitaj temoj.

Ni ne povas eviti la temon de UK, sed multaj ĝin elektos. Mankos originaleco por la jurio. Do indas ĉerpi sentojn.

- Ni kreu per niaj propraj sentoj la impresojn de Charles Brunet je la kongreso de Bulonjo.

- Aŭ la partoprenon de Bergonié.

- Extrapolation à partir du thème de Seán : Kiam UNESKO adoptis Esperanton, dank' al la laboro de Ivo Lapenna.

- Rencontres : pratique orale de l'espéranto.

Récit d'une vingtaine de lignes.

Poste **Marcelo** proponas omaĝon al Ĵak Le Puil, « artiste rêveur ». Traducteur de chansons, de romans (p.ex. *Voyage au bout de la nuit*), fondateur-rédacteur de La KancerKliniko.

Nous chantons ensemble quelques chansons qu'il a chantées et enregistrées :

- La dizertonto (trad. Georges Lagrange)

- Lili (trad. André Cherpillod)

- Mortadi pro ide' (trad. G. Lagrange)

Ĵak verkis melodion sur Esperanto-teksto: *Versaĵo sen fino* (Felikso Zamenhof)



En la sekva parto de la posttagmezo, Marcelo proponas malkovri Frislandon kaj la frisan lingvon, tra personaj rememoroj.

Marcelo vizitis Frislandon en 1994, ĉe Ankie kaj Nanne, en 1996 kaj 1997, pri kio li konservas tre karan rememoron. Specifa memoraĵo pri la mano de Marian, kiu prenis la lian, dum forte malvarmis.

Nanne iom antaŭe verkis muzikon el markanzono: *La valseto de blanka lumturo*.

En 2000, Marcelo verkis poemon el la muziko de Nanne. En 2004, li estis invitita en la festivalo de Workum, kie staras la Blanka Lumturo.

La kanzono estis publikigita en 2011 sur KD «*Kajto Duope*».

Marian Nesse forpasis en 2022. Ŝia lasta koncerto estis en Cambes por la 50-jariĝo de Espertanto-Gironde.



Kajto (kun Marian maldekstre)

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 22an de februaro 2026

de la 10a 30 ĝis la 16a



Ĉeestas: Jean-Seb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Lucienne Laroche, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernardo, Rose kaj Maeva Sarlandie

Senkulpigitaj: Gloria Gargallo, Joël Lajus, Dominiko, Eric Tiffon

Elvezio:

- Raporto pri la prezento de Esperanto en Sainte-Hélène. Dudek unu partoprenintoj, el kiuj Yvette el Lacanau.
- La kursoj en la universitato normale okazas kun 4 studentoj. Spektis la filmeton Himalia en Esperanto ĉe ARTE (20 minutoj).
- Mendis la albumon pri kiu parolis Joël en la pasinta kunveno. Ilustraĵoj de ChatGPT. Mankis unu paĝo (la nura, kie oni parolas pri Esperanto). La aŭtoro ĝin sendis poste. Pri Brassens: unu ekzemplero estis mendita de la universitato. Pri La Grajneto: Renkontoj okazas merkrede.

Hervé: Ĉeestis en la pasinta; li estis sola.

Elvezio: Kongreso de Espéranto-France en Hérouville Saint-Clair de la 12a ĝis la 15a de majo.

Bernardo: Aĉetis la *Journal du Médoc*, kun la artikolo pri la prezento de Esperanto en Sainte-Hélène.



Luca: Komencis Erasmus-programon en Tours pri Esperanto por transnacia migrado. Perreta kurso, ĉiun mardon. Dum unu semajno en junio la kursoj okazos surloke, kun atelieroj. La studentoj nun laboras laŭ grupoj. Tiu de Luca estas «Kiel Esperanto povas plibonigi lingvolernadon». La laboro de ĉiuj grupoj estos prezentita en Tours. Partoprenas inter sepdek kaj okdek gestudentoj el diversaj lingvoj kaj landoj.

Decido (aprobata de ĉiuj ĉeestantoj): Esperanto-Gironde pretas partopreni en la elspezoj rilataj al tiu staĝo: vojaĝ- kaj restad-kostoj (tamen iu esperantisto en Tours povos gastigi).

Marcelo: - Ĉiun duan vendredon okazas reta renkonto kunanimata de koreo kaj japanino. Marcelo partoprenis en la du pasintaj renkontoj, en kiu partoprenis ankaŭ 14 personoj el pluraj landoj. Ĉiu partoprenanto prezentas temon dum 5 minutoj.

- Pri la romano *La valizeto 518*: Ĝi enhavas 280 paĝojn, jam estis engaĝigita. Pluraj nefranclingvanoj kontrollegis: Dinah Mackenzie, Seán, Maria Merla (germanlingva). Janine helpas por elekti inter pluraj proponitaj elekteblecoj.

- Aliaj projektoj:

Kun la perigorda grupo: kuntraduko de *Jacquou de Croquant*. Kontrollegas Istvan Ertl.

Spektaklo por la UK en Graco: antaŭ du tagoj ricevis la kanzonojn de Kajto. La marta kunveno de Espéranto-Gironde povos esti okazo por ilin prezenti.

La organizantoj de UK estas tre interesataj; Marcelo petis senpagan aliĝon al la UK por la artistoj, aŭtoroj, teknikisto.

La venonta kunveno okazos en Toctoucau, Maison de quartier, avenue Georges Pelletier.

Janine faras demandon pri membreco en Espéranto-Gironde, pro tio, ke la responsulo de la retejo kaj de la informletero ne volas membriĝi en la asocio.

Klodin': Ĉu la informletero estas tiu de Espéranto-Gironde aŭ ĉu ĝi celas informi pri ĉio, kio okazas rilate al Esperanto en Ĝirondio?

Decido (aprobata de ĉiuj ĉeestantoj): La responsulo pri la reto kaj informletero aliĝu al la asocio. Estos proponite al li, ke li estu en la kontrollega skipo de LEGI.

La kunveno finiĝas je la 12a.

Post la manĝo ni laboras pri la eseo.

Tablo 1: Pri la rememoroj de Charles Brunet el la Unua Kongreso en Bulonjo.

Tablo 2: Pri la agnosko de Esperanto fare de UNESKO

Tablo 3: Aliaj

Je ĉiu tablo, unu el la partoprenantoj faros resumon de tio, kio estis farita, por la venonta kunveno. Katya verkos la tekston por la tablo 3, ĉe kiu laboris ŝi kaj Klodin', Bernardo, Janine, Yannick.



Nekrologo: Rob Moerbeek

Rob Moerbeek (1936–2025) estis elstara esperantisto, filologo kaj aktivulo, dediĉinte sian vivon al la Esperanto-movado. Pri lia aktiva vivo, kiu pli bone ol li mem povis paroli? Legu do lian mem-biografion publikigitan de ILEI ĉe <https://libro.ee/file.php?id=4209>

Kiel SATano Rob havis fortan socian sentemon. Li aktive subtenis blindajn kaj ceterajn handikapitajn esperantistojn, tradukis gvidbroŝurojn pri kontakto kun vidkaj mov-handikapuloj. Dum jaroj Rob reprezentis la Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj kun sia edzino Nora, blinda tradukistino. Ilia grava agado disvastigis alireblajn materialojn en la movado. Nora forpasis en 1998, tamen kelkajn monatojn poste Rob animis la Internacian Kongreson de la Blindaj Esperantistoj (IKBE) en Bordojo. Tiu evento kunigis nin kaj kelkajn jarojn poste li kore vizitigis Haarlemo al ni. Tre ŝercema, al Rob ne mankis humuro kaj petolemo. "Ĉu ne iras ni samdirekten sur la verda vojo?" li demandis al mi, kiam ni amuze enŝovis po unu piedon en la saman gigantan lignoŝuon.

Post sia emeritiĝo Rob partoprenis en la redaktoskipo de Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo. Liaj lingva kompetenteco kaj kleriga verkemo kontribuis al la kvalito de la SATaj eldonaĵoj.

Rob Moerbeek restos en nia memoro kiel modesta, laborema intelektulo, kiu dediĉis sian tutan vivon al justeco, alireblo kaj Esperanto.

Marcelo kaj Klodin'



Iom nostalgie:

KINEJO UTOPIA EN PALMER: JARFINAJ NOVAĴOJ!

La projekto pri nova kinejo Utopia en la Kastelo Palmer en Cenon planas malfermon en 2026. Antaŭ la alveno de tiu aparte simbolplena jaro, la aŭtoroj partigas freŝajn novaĵojn pri ĉi tiu iniciato, kiu konsistas el tri malgrandaj salonoj (po 122, 54 kaj 76 sidlokoj) kaj altigos ĝis 30 la nombron de ekranoj sub la standardo Utopia. 30 el 6355 en Francio. Tiu modesta skalo estas konscie asertata, des pli en kunteksto de forta kaj senprecedenca koncentriĝo de la kineja industrio.



Ja necesas kritiki la kreskantan hegemonion de grandaj ekonomiaj grupoj, ilustritan de la aĉeto de Warner fare de Netflix kaj de la eniro de Canal+ en la kapitalon de UGC, kun riskoj de ideologia kontrolo kaj vertikala integriĝo de produktado kaj distribuo. Fronte al ĉi tiuj tendencoj, la aktoroj de la sektoro ofte troviĝas inter rezignacio kaj malkomforto.



La jaro 2026 markos ankaŭ la 50-jariĝon de Utopia, kies unua kinejo malfermiĝis en 1976 en Avinjono. Fidela al siaj valoroj de sendependeco kaj malsameco, Utopia konceptas la kinejon Utopia Palmer kiel popol-proksiman, homskalan, profunde enradikiĝintan en sia kvartalo. Ekologie pensita kaj socie malfermita, ĝi celas esti vera loko de kulturo kaj vivo, respondo al la defioj de la morgaŭaj kinejsalonoj.

Por legi iom pli pri la evoluo de la laboroj:

<https://www.cinemas-utopia.org/U-blog/bordeaux/index.php?post/2025/12/15/UTOPIA-PALMER-%3A-POINT-D'ETAPE-ET-ARRIVÉE-DES->

[CONTREPARTIES-%21](#)

Marcelo

KAJTO en ' AER', **Artista Efemera Rondo** proponas
por la kultura programo de la 111a UK 2026 en Graco

Sorĉe de verda stelo

Interkultura teatra kaj kanta spektaklo

Originala teksto kaj surscenigo: Marcelo Redulez

originalaj muzikoj: Nanne Kalma

originalaj pentraĵoj: Kyina Choi

daŭro 1h20.

El samtitolita novelo, kvin geamikoj el Nederlando, Korea Respubliko kaj Francio proponas interkulturan spektaklon: Maroj kunligas la kontinentojn kaj eĉ junan paron, kvankam unuavide tiuj gejunuloj neniel pretus renkontiĝi. Ĉu Esperanto sukcese intervenos por levi la obstaklojn inter tiuj sud-korea aktivulino kaj bretona nedecidema velŝipano?

Kajto kaj Amira Chun akompanas per kantoj la tekstojn teatrece legatajn de Haesim Park kaj Marcelo Redulez.

La spektaklon ilustras pentraĵoj de Kyina Choi, kiuj invitas la publikon kunkanti laŭ la projekciitaj paroloj de la kantoj.

Tiu projekto kronas la 35-jaran komplikecon de KAJTO kun Marcelo Redulez kuniĝante novajn talentojn el fora Koreio.



Kyina

Ankie

Nanne

Amira

Marcel

Haesim

AER' 2026 konsistas el:

Kajto: Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma, frisa multfaceta artista paro

Amira Chun (CHUN Kyung Ok): Seula kantistino, kiu kantis la himnon dum la UK en Brno

https://eo.wikipedia.org/wiki/Amira_Chun

https://www.youtube.com/channel/UC5we6pvEPvpt_teWH-qAm2w/videos

Haesim Park: sekretariino de KEA, la Korea E-Asocio.

Marcelo Redulez: animanto de la teatra kaj kanta trupo *La Kompanoj*, kreinta kaj prezentinta la nacian vesperon *'Brel inter la gigantoj'* de la 100a UK en Lillo (2015).

Kyina Choi: Korea pentristino, kies talento kolore reliefigas la spektaklon.

La teamon kompletigos nomumota teknikist(in)o.

Krom tiu spektaklo la profesiaj artistoj proponas kanti dum la solenaj malfermo kaj fermo de la kongreso. Sed ankaŭ animi budon de la movada foiro, kantatelierojn dum la semajno, kaj prezento de du eldonotaj libroj vendeblaj en la librejo *Sorĉe de verda stelo* kaj *La valizeto 518*, ambaŭ verkoj de Marcelo Redulez.

Laŭeble la spektaklo estu prezentita la ĵaŭdon, por doni al la artistoj tempon komence de la semajno por kunekzerciĝi kaj instrui la kantojn al la publiko dum kantatelieroj.

Korajn salutojn,

Membroj de l'AER' 2026



NIAJ KURSOJ

En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono G-207, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



NIA BRASSENS EN LA UNIVERSITATO!

Jen nia Brasensa ĉefverko, finfine ĵus alveninta hejme, sur la esperanta bretaro de la universitata biblioteko.

Elvezio



De E-vojaĝanta Ruslandano : artikoleto por via revuo...

Jorgos

EL NOTLIBRO DE VOJAĜANTO.

En la notlibro de iu vojaĝanto aperis jena noto dum li preterpasis sabate vespere iun vilaĝon en franca provinco...

«En la vilaĝo Verniolle mi trovis belan ZEO-on - Ĝardeno de Esperanto (43.080805 N, 1.649219 O).

Dum mi fotis ĝin mi rimarkis, ke la fosto de "Jardin de l'Espéranto" kliniĝas for de la rekta linio al la fina venko (Bildo 1).

Je mia miro en mallumo de novembra arjeĵuja nokto aperis loka esperantisto, kiu korektis la situacion! (Bildo 2).

Inter Esperantistoj-ĝardenistoj estas onidiro, ke kun bona zorgo ĝardeno de Esperanto povas fruktedoni dum la tuta jaro.

Sukcesojn al diligentaj kolegaranoj!».



Granda balo sur kampo

Mi de ĉiam ŝategis la vesperajn somerhorojn. Vi scias... tiun tempon, kiam taglumo oriĝas, aero ankoraŭ tenas iom da varmo, dum la ombroj jam longiĝas. Ĝuste tiam ĉio ŝajnas ebla. Hodiaŭ ĉirkaŭ mi sentiĝis forta ekscitiĝo. Oni murmuris, ke okazos la Granda Balo de la Verdaj Steloj.

— Vi certe devus partopreni! diris mia najbarino, svingante la falbalojn de sia robo kiel lekanto siajn petalojn.

— Ho, vi scias, mi estas tro timema... mi respondis.

Tamen tiu propono logis min. Oni parolis pri koncerto de la famaj skaraboj, pri lumskulptaĵoj far lampiroj, kaj eĉ pri eleganteca konkurso por elekti la plej belan veston de la nokto.

Kiam noktiĝis, mi venkis heziton kaj kuraĝe ekiris. La dancoplaco jam estis plena: kelkaj balanciĝis malrapide en papaveroruĝaj jupoj, aliaj pozis kun lavende parfumaj kaj memfidaj mienoj, dum ceteraj moviĝis sen gracio kiel sonkoj en vento.

Mi apenaŭ faris kelkajn paŝojn, kiam mi aŭdis murmuron:

— Kiu estas tiu novulino?

— Rigardu tiujn strangajn harojn!

Jes... miaj haroj: ia filigrana kasko, malordaj sed senespere nerigideblaj. Mi longe provis kombi ilin kiel la Botiĉela Venuso. Vane. Tial ĉinokte mi decidis akcepti ilin tiajn, kiaj ili estas.

Belulo irida, surkape portante fezon*, alproksimiĝis:

— Fraŭlino, ĉu vi honorigos min per kundanco?

Ni turniĝis, rondiris... mi eĉ ridadis! Mia timemo forvaporigis, kaj mi sentis min tiel malpeza kiel la brizo.

Noktomeze oni anoncis la gajninton de la eleganteca konkurso. La ceremoniestrino proklamis:

— Kaj la plej eleganta estaĵo de la vespero estas... la mistera sinjorino kun la bluaj petaloj!

Aplaŭdoj laŭtegis. Spite al stamfantaj ĵaluzulinoj, pluraj ĉeestantoj ĝoje fajfetis. Mi ricevis mian kronon kun emocio: simpla ringo plektita el herberoj kaj roso. Jen unuafoje oni rigardis min kiel belan, ne nur kiel sovaĝan.

Mateniĝe, reveninte en mian kutiman lokon mi pensis:

«Finfine, ne estas tiel malbone flori kiel Nigelo damaska.»

*PIV: **fez/o**^z. Ĉapo el ruĝa aŭ blanka drapo, kun pendanta kvasto, en formo de renversita florpoto.

Enigmo: En la supra teksto listiĝis sep plantonomoj. Kiuj?

Nigella damascena
nigelle de Pamas ou cheveu-de-Vénus
ranunkolacoj

10-50cm
maj-jun - unujara

Nigelo damaska

La abeloj alfloriĝas sur nigelajn petalojn kaj poste ĉirkaŭe rikoltas nektaron en malsimple formaj ujetoj.

La nomo devenas el la latina *nigellus*, nigreca, pro la koloroj de la semoj. Kaj mezepoke la importintoj venigis ĝin laŭ Orienta komerco el Sirio tra Damasko. Orientalismo! Ekzotismo!



221

Nigella damascena
nigelle de Pamas ou cheveu-de-Vénus
ranunkolacoj

10-50cm
maj-jun - unujara

Nigelo damaska

La fruktoj ornamas sekajn bukadojn. Ĉifitaj semoj fragece ekzotike odoras.

Nigelo estas ankaŭ kromnomata «*haro de Venuso*».



semo



seka frukto

222

Marcelo

(Solve de la enigmo en venonta numero de LEGI)

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**

98 route du Mouquet

40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

☺☺

<https://esperanto-gironde.fr/informletero/>

**La venontaj kunvenoj okazos je la 10a30 la 26an de aprilo (Ĝenerala Asembleo);
en la salle du Bourg en Pessac, la 24an de majo kaj la 28an de junio.**

